

ĈEA-Retkomunikoj 2017/04

Estimata leganto,

permesu al mi saluti vin post somero. En tiu ĉi numero vi trovos interesajn ligilojn al multmediaj novaĵoj. Ne mankas ankaŭ elekto de plej proksimaj eventoj. Ne forgesu, ke se vi ankoraŭ ne aliĝis al la konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, vi havas ŝancon ĝis la 15-a de septembro, tiam finiĝas la unua, plej favorpreza aliĝperiodo! Do, agrablan legadon!



ĈEA-Konferenco en Kroměříž

- baldaŭ finiĝas la unua

aliĝperiodo!



Ĉu vi ne ankoraŭ aliĝis al la [ĈEA-Konferenco en Kroměříž](#) (13.-15.10.)?
Sciu, ke vendrede 15.9. finiĝas la unua finance la plej avantaĝa limdato!

Krom la necesa laborprogramo atendas vin i.a.: promeno tra la bela urbo kaj vingustumado en la Ĉefepiskopa vinkelaro, prelego pri d-ro Zamenhof, teatraĵo por unu aktoro, diskuto kun partoprenantino de UK-o en Seulo kaj kun ĈEJ-membroj pri IJK en Togo, "Solena vorto" de Max Kašparů, societa vespero kaj komuna kantado.

Al interreta aliĝilo kun pli detalaj informoj [KLAKU ĈI-TIE!](#) Ni antaŭĝojas vian partoprenon☺!

INTERNACIA RENKONTIĜO EN SVITAVY

Samtempe vi povas ankoraŭ aliĝi al Internacia renkontiĝo en Svitavy (inter 22-a ĝis la 28-a de septembro)! Limdato por aliĝo estas ankaŭ la 15-a de septembro. Vi povas partopreni ankaŭ nur dum kelkaj tagoj, laŭ via volo. Uzu tiun ĉi aranĝon kiel ŝancon por renkontiĝi kun partoprenantoj el Britio, Francio, Germanio, Pollando kaj Slovakio kaj kiel eblecon viziti la novan ekspozicion "La Homo kontraŭ Babelo" en la Esperanto-Muzeo en Svitavy. Pli da detaloj kaj programon vidu ĉe [la paĝo de la aranĝo](#).

Multmediaj novaĵoj

FILMOJ

Turismo [Pardubice - la urbo prezentas sin](#)

Oficialan kvarminutan turisman filmon tradukis kaj laŭtlegis Pavol Kaščák el Verda Stacio. Realigite kadre de la projekto "Pardubice - lulilo de Esperanto en ĉeĥaj landoj". La premiero okazis kadre de la inaŭguro de la ekspozicio "La Homo kontraŭ Babelo" 10.6.2017.

Muziko [Dua parto de la koncerto de la muzikgrupo SENPROBLEME](#)

(NOPROBLEM Kostelec na Hané) en la salonego de la Ottendorfer-Domo en Svitavy (kadre de la inaŭguro de la nova ekspozicio en la Esperanto-Muzeo 10.6.2017). Filmis kaj prilaboris Pavol Kaščák el [Verda Stacio](#).

Prelego [František Vladimír Lorenc - v Čechách zapomenutý génius](#) - česká verze přednášky, která proběhla 9.6.2017 v Muzeu esperanta (ĉeĥa versio de la prelego pri F.V.Lorenz)

FOTOGRAFAĴOJ

Nova fotoalbumo: [Pardubice - lulilo de Esperanto en ĉeĥaj landoj](#)

Novaj fotoĵoj en la albumo: "[La Homo kontraŭ Babelo](#)" (pri F.V. Lorenz)

Novaj fotoĵoj en la albumo: "[Regiono Pardubice](#)" kun ligiloj al vikipediaj artikoloj

SONREGISTRAĴOJ

Novaj sonartikoloj de Jaroslava Malá en la [RETA RADIO](#)

[SES 2017 en Slovakio kaj nova versio de himno](#)

[Sekreto de kontentaj paroj: 10 kondutoj, kiujn vi devus imiti!](#)

[La antikva mondo havis siajn sep miraĵojn](#)

[Fabelo por plenkreskuloj](#)

[Sudbohemiaj fiŝlagoj](#)



Rememore pri Miroslav Smyčka okaze de la neĝisviva 91-a jaraĝo (11.9.)

[Petr Bezruč - poemo "Nur solan fojon"](#) (Jen jedenkrát) - sonregistraĵo el 2009, omaĝe al la 150jariĝo de naskiĝo de la poeto (15.9.)

ARTIKOLOJ

Elekto de artikoloj de la membroj de la katolika sekcio de ĈEA en la gazeto Dio Benu 2017/2 kaj 3

Max Kašparů - [FALSA TROMPILO](#)

Miloslav Šváček - [REMEMORO PRI KARDINALO VLK](#)

Miloslav Šváček - [TIAM ANTAŬ KVARDEK JAROJ](#) - rememore pri la perforta likvido de la Katolika Esperanto-Tendaro okazinta en la vilaĝo Herbortice fare de la tiama komunista ŝtata polico

Jan Kalný - [CENTJARA JUBILEO DE FATIMA](#)

Sac. Jan Filip - poemo [LA LASTA TENDARA FAJRO](#)

Václav Nosek - [LA MALGRANDA BANLOKO EN LA REGIONO HANÁ, ĈEĤIO](#)

Oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kreskas!

Jam monato kaj duono funkcias oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Celo de la paĝaro estas informi vin pri novaĵoj de la esperanta movado en Ĉeĥio kaj en la mondo. La redakcia teamo klopodas ĉiun tagon oferti ion interesan! [Sekvu nin ĉe Facebook!](#)

Eventoj

Ni elektas el la plej proksimaj eventoj, kiuj okazos ne nur en Ĉeĥio:

17/9, 24/9, 28/9: Tostoj por Zamĉjo

Festu la JARON DE ZAMENHOF kaj venu partopreni la aranĝetojn kun nomo "TOSTO POR ZAMĈJO". La plej proksima aranĝo okazos la [17-an de septembro en Liberec](#). Sekva, okazos la [24-an de septembro en Chrudim](#), la [13-a Tosto poste la 28-an de septembro en Prago](#).

24/9: Amika vizito en la Esperantomuzeo en Vieno

Neformala, amika vizito al la Esperantomuzeo en Vieno, organizata de [E@I](#). Detaloj [ĉi tie](#).

6/10-8/10: 12-a BIERo

Brila Internacia Esperanto Renkontiĝo! E-mental' invitas vin partopreni jam la 12-an

BIEROn!!! Inter planataj programeroj estas vizito de bierfabriketoj Polivar kaj Štramberk, grimado sur belrigardturojn, vizito de kastelo Štramberk, gustumado de loka dolĉa specialaĵo, ludoj, bunta kutima matenmanĝegado... Aktualan programon vi povas vidi [ĉi tie](#).

Se vi volas scii pli aliaj eventoj, vizitu [nian paĝon](#) aŭ ankaŭ retejon [Eventoj.hu](#) - internacian kalendaron de Esperanto-aranĝoj!

Ĉu vi volas aboni ĈEA-Retkomunikaĵojn? Skribu al retkomunikaĵoj@esperanto.cz !